



Venontaj eventoj

Hodiaŭ

- ★ **2:00 ptm:** Meja kaj Steĉjo anoncos konkurson pri trezorserĉado ĉe UCSD. (Vidu regulojn kaj liston de trovendaĵoj en paĝo 2.) Kunvenu en la komuna salono.
- ★ **2:45 ptm:** Ekskurseto: Meja kaj Steĉjo kondukos drinkemulojn al BevMo, loka vendejo por trinkaĵoj (inkluzive de alkoholaĵoj). Renkontiĝu antaŭ la loĝejoj.
- ★ **7:30 ptm:** Katalin instruos preparacion por la KER-ekzamenoj. Kunvenu en la komuna salono.

Vendredo

- ★ **1:30 ptm:** Ekskurso: akvario Birch
- ★ **7:30 ptm:** Tabul-ludoj en la komuna salono

Sabato

- ★ **10:00 atm:** Ekskurso: Urbocentro de La Jolla kaj la golfeto La Jolla Cove

Dimanĉo

- ★ **11:00 atm:** Ekskurso: plaĝo Black's Beach
- ★ **ptm:** Ekskurso: fajraĵoj en La Jolla. La spektaklo komenciĝos je la 9-a ptm, sed ni ekiros pli frue, je la 7-a.

La NASKa Fasko

Redaktejo: Asante n-ro 116
<nask.esperanto@gmail.com>

La NASKa Fasko aperas lunde – vendrede dum la kursaro. Kutime ĝi aperas tagmeze. Se vi ne ricevas ĝin post la matenaj klasoj aŭ en la manĝejo, prenu ekzemplon el la skatolo kiu troviĝas sur la fenestro de la redaktejo.

Ni avide atendas viajn artikolojn, fotojn, desegnaĵojn, bildstriojn, poemojn, viajn am-leterojn... preskaŭ ion ajn! Memoru, la Fasko estas taggazeto **por vi kaj pri vi**: viaj kontribuajtoj igas ĝin interesa. Do nepre kontribuu!

Se vi ne sentas vin tute kompetenta pri verkado, ne timu; ni volonte helpos vin korekti kaj poluri. Serĉu unu el niaj lingvo-helpantoj; sur siaj nomŝildoj ili portas specialajn glumarkojn kun rideto (☺) – kaj ili ridetante helpos vin korekti, poluri, kaj plibonigi vian verkon. Kiam la verko pretas, sendu ĝin per retpoŝto al la adreso supre, aŭ simple portu ĝin piede al la redaktejo.

Ĉu vivanta Esperanto-kulturo?

de Orlando E. RAOLA

Plej probable vi iam argumentis kun skeptikemulo, kiu certigis al vi, ke eble Esperanto estas tre bona, facila lingvo, sed ke ĝi tute ne havas propran kulturon... Komprenible, vi pacience eltenas la stultajn, kaj mordetas vian langon por malebligi al via buŝo superŝuti vian kunparolanton per milo da nekontesteblaj faktoj, kiuj certe pravas la malon: la ekziston kaj vivantecon de Esperanto-kulturo. Kaj tute ne temas pri surgenua adorado de la Majstra kalva busto, nek pri kakofonia grakado de La Espero, nek pri flirtigado de mil verdaj standardoj... Tute ne! Temas pri la ekzisto de komunumo ene de kiu la homoj povas ja ĉiajn spertojn kaj emociojn havi kaj esprimi pere de ties komun(um)a lingvo.

Mi ŝatus dividi kun vi ekzemplon de tia funkciado. Antaŭ dek tri jaroj, okazis en Sanfrancisko la jarkongreso de tiam ELNA, nun Esperanto-USA. Partoprenis ĉirkaŭ okdeko da homoj, inter ili aro de eksterlandanoj el Finnlando, Japanujo, Meksiko ktp. Kadre de la kongreso, okazis oratora konkurso, kie la partoprenantoj ricevis temon sur karteto kaj havis kvar horojn por sin pretigi. La gajnintojn oni decidis laŭ laŭdeco de la aplaŭdo post ilia prezentado. Ili estis juna duopo, kiun konsistigis Lana ŜLAFER (denaska esperantistino, rusdevena usonanino) kaj Stefano BODDINGTON (brito nun loĝanta en Belujo). La temo, kiun ili ricevis de la konkurs-organizantoj estis: "Artefaritaj mamoj". Jen, kion ili diris surpodie:

Stefano: Por trakti tiun ĉi tiklan temon, ni decidis, ke ni bezonas du homojn, kaj por tion fari ni faros etan rolludon de juna paro, kiu diskutas pri artefaritaj mamoj.

La viro (Stefano): Ĉu ne estas bona ideo, ke vi akiru artefaritajn mamojn?

La virino (Lana): Kio? Estas nura staraĵo, sed tio estas tre danĝera por mia sano... Ĉu vi volas, ke mi estu via pupo?

S: Tute ne, kara, mi ne volas ke vi havu tiujn por mi, estas por vi!

L: Sed... por mi? Mi ne bezonas ilin, mi estas kontenta, kia mi estas nun.

S: Sed kara, se vi havos tiajn pli grandajn mamojn vi sentos vin pli fiera, vi havos pli da sinamo, kaj vi havos pli da memcerteco, kio certe helpas al vi en via laboro...

L: Tute ne! Tio estas nur la komenco. Poste vi volos ke mi nazon plimalgrandigu, vizaĝstreĉiĝon havu, kaj gras-elsuĉiĝon, kaj finfine, mi estos Majkel JAKSON.

S: Sed kara, ne temas pri la tuta korpo, la mamoj estas la ĉefa eco de la virino, ĉu ne? Kaj finfine, la viroj ja volas ion por knedi.

L: Se vi volas knedi... iĝu bakisto! Kaj mi devos zorgi pri tiuj artefaritaĵoj, kaj ripari ilin kiam ili rompiĝos, aŭ dislokiĝos...

S: Nu, kara...

L: Se vi volas ke mi faru tion, do vi faru... gras(ig)an suĉon!

S: Do, tiam ni forgesu la tutan aferon...

Duope: Do, artefaritaj mamoj: allogaĵo por viroj, abomenaĵo por virinoj!

Postvespermanĝa anonco

Steĉjo skribis: "Antaŭ kelkaj monatoj mi trovis intervjuon kun Kabe kiun oni faris post kiam Kabe forlasis la Esperantomovadon. Post la hodiaŭa vesperprogramo malgranda grupo diskutis la intervjuon, kaj almenaŭ kelkaj volis ĝin legi. Mi pensas ke la Fasko estas la plej efika maniero ebligi al ĉiuj interesitoj trovi la intervjuon."

Jen la ligilo:

<<http://esperanto.org/Ondo/H-kabe.htm>>

Tukoŝanĝoj kaj purigado

Ĉu vi sopiras al puraj tukoj? Ĉu vi scivolos, kiam oni venos por purigi vian ĉambraron? Ellen sendis la jenan informon:

- Ĉiun trian tagon, la purigistoj venas por purigi kaj polvosuĉi la ĉambrarojn.

- Ĉiun ĵaŭdon ili forprenos la malpurajn tukojn. Kolektu ĉiajn litotukojn kaj bantukojn, kaj amasigu ilin en unu lokon por la purigistoj. Ili ne eniros viajn proprajn dormoĉambrojn, do elektu lokon en la komuna parto de via ĉambraro.

- La purigistoj lasos por vi la ĝustan nombron da puraj tukoj sur la manĝotablo.

Atentu la manĝohorojn!

Ellen menciis ke kelkaj NASKanoj bedaŭrinde mistrakis siajn manĝojn ĉe *Café Ventanas* pro tro frua aŭ tro malfrua alveno. Malgraŭ tio, ke la manĝejo estas malfermita dum multaj horoj, por certe ricevi manĝaĵon estas saĝe alveni inter la jenaj horoj:

- matenmanĝo: 7:30 – 8:30 atm
- tagmanĝo: 12:45 atm – 1:30 ptm
- vespermanĝo: 5:30 – 6:30 ptm

Konkurso pri trezorserĉado

La konkurson elpensis Meja. Ŝi kaj Steĉjo prezentos la konkurson hodiaŭ je la 2-a ptm en la komuna salono. Venu kaj ekludu!

Celo: Gajni tiom da poentoj kiom vi kapablas.

Por gajni poentojn, oni devas trovi la aĵojn en tiu ĉi listo kaj esti en fotoj kun ili.

Reguloj:

- Oni tute rajtas ludi sola. Foje tio povas plirapidigi la serĉon, sed ankaŭ povas igi la serĉon pli defia.
- Oni ankaŭ tute rajtas ludi en teamoj. Se vi ne havas fotilon, plej bonas se vi formos teamon kun almenaŭ unu alia homo kiu fotilon havas.
- Se vi ludas kiel teamo, almenaŭ duono de via teamo bezonas esti en ĉiu foto por gajni poentojn per la foto.
- Oni tute rajtas peti helpon, vojaĝinstrukciojn, kaj priskribojn de iu ajn por trovi la serĉaĵojn.
- Metu viajn fotojn en dosierujon en komputilo kaj ilin konservu. Nomu viajn fotojn per iuj nomoj kiuj iel priskribas kiun serĉaĵon vi trovis en la foto. Nomu vian dosierujon per via nomo aŭ per la nomoj de la homoj en via teamo. Meja kolektos la dosierujojn de vi iam ekde la 12-a de julio ĝis la 14-a de julio 2010.

Aliaj aferoj:

- Almenaŭ unu foto de ĉiu teamo aŭ ludanto aperos en unu el la finfinaj prezentoj de NASK 2010.
- Foje aperos konsiletoj pri kelkaj el la serĉluderoj en la NASKa Fasko por helpi al vi ilin trovi.
- Ni volas havi premion por la gajnanta(j) homo(j), sed ni ankoraŭ ne scias kio ĝi estu.

Kaj jen la listo!

Ĉiu el ĉi tiuj meritas 5 poentojn:

- Sundio*
- Blua palisaro en la aero inter arboj*
- Skulptaĵo de etaj budaoj kiuj spektas televidilon*
- Grandaj ŝtonoj en kiuj oni povas trovi la literojn UNDA*
- Granda tablo farita el malhela ŝtono en kiu multaj esprimoj estas ĉizitaj*
- Skulptaĵo de kaŭranta virino farita el metalo
- Skulptaĵo de afrikaj vizaĝoj kaj bestoj kiuj venas el metala ŝtonego
- Ŝildo en kiu la nomo de Grant GOODALL troviĝas
- La maro
- La kosmoŝipeca biblioteko Geisel

Ĉiu el ĉi tiuj meritas 10 poentojn:

- Arbo kiu neniam parolas pro lamentado pri aliaj arboj el kiuj oni faris librojn*
- Arbo kiu ja parolas*
- Arbo kiu eĉ kantas*
- Trinkfontano kiu troviĝas inter arboj kaj proksime al flago, kaj kiu donas inteligentigan akvon al studentoj*
- Vojo farita el grandega serpento*
- Buntaj pordoj kiuj surhavas la vortojn "READ WRITE THINK DREAM"*
- Granda muro kaj spaco en kiu troviĝas horloĝoj, novaĵstrioj, kaj famaj esprimoj*
- Grandaj blankaj ŝtonpilkoj
- Skulptaĵo de Doktoro Seuss kaj la kato portanta ĉapelon
- Ĉambro (aŭ ŝtuparo aŭ koridoro) en kiu la muroj plenas de grafitio

- Ŝtonbloko kiu surhavas la jaron en kiu vi diplomiĝis (se vi neniam diplomiĝis, ne volas konfesi kiam vi diplomiĝis, aŭ ne memoras kiam vi diplomiĝis, vi rajtas anstataŭe trovi la ŝtonblokon kiu surhavas "Class of 2010")

- Skulptaĵo/fonto de marviro

- Konstruaĵo kiu havas murojn, kiu ŝajnas esti farita el grandaj balonoj.

Ĉiu el ĉi tiuj meritas 20 poentojn:

- Skulptaĵaro kiu iom aspektas kiel Stonehenge*
- Konstruaĵo ĉirkaŭita per grandaj neonaj vortoj kiuj nomas sep virtojn kaj sep malvirtojn*
- Trankvila loko inter arboj kie restas memorigaĵo al studento kiu oferbruligis sin dum la usona milito en Vjetnamujo por ĝin protesti.
- Grandega urso farita el ŝtonoj
- Televido kiu montras bildojn en 3-D sen igi la spektantojn porti specialajn okulvitrojn
- Horloĝo kiu havas tri vizaĝojn
- Grandega verda seĝo
- Muro kiu faras sonon kiel laserpafilo kiam oni ĝin piedbatas
- Skulptaĵo de ankro kiu estas konstante repentrita

Ĉiu el ĉi tiuj meritas 50 poentojn:

- Metala mapo de La Jolla kiu troviĝas en loko kie on povas vidi en la realo la surmapajn lokojn*
- Skulptaĵo de grandega ruĝa ŝuo*
- Terasa spaco kiu enhavas benkojn, arbojn, kaj ŝtonplankon*
- Skulptaĵo de staranta virino kiu havas stelkolĉenon kaj ploras per siaj manoj*
- Tablo kiu ankaŭ estas ŝaktabulo
- Ruĝa brit-stila telefonejo
- Fonto kiu laŭliniigas kun la sunomalleviĝo
- Eta konstruaĵo en kiu soldatoj praktikis siajn kapablojn antaŭ ol la universitato ekekestis
- Ĉambro kaŝita kiu estas tute ekstere – ĝi havas murojn, plankon, kaj plantojn sed mankas al ĝi tegmento.
- La tablo kiun uzis la UCSD-anoj dum la pasinta jaro kiel la Esperantan lingvotablon.

Ĉiu el ĉi tiuj meritas por ĉiu malsama ekzemplo kiun vi povas trovi po 2 poentojn.

- Sunpaneloj
- NASKanoj+
- Aŭtetoj
- Malsamaj specoj de floroj
- Aliaj fontoj ne en ĉi tiu listo
- Neonaj ŝildoj
- Hazarda esperantaĵo
- Aliaj skulptaĵoj ne en ĉi tiu listo

* Skulptaĵoj en la listo kun tiu marko estas partoj de la Artkolekto Stuart, sed ili ne ĉiuj estas nomitaj ĉi tie per la oficialaj nomoj uzataj por la Artkolekto Stuart. Por fotoj kaj pli da informo pri tiu artkolekto, vi rajtas uzi la reton kaj viziti: <<http://stuartcollection.ucsd.edu/StuartCollection>>

+ Tiuj fotoj devas enhavi nur vin (aŭ la minimuman nombron da homoj el via teamo depende de la grandeco de via teamo) kaj po unu NASKanon. Pro tio, ekzemple, la grupa foto ne meritas poentojn ĉar ĝi enhavas tro da homoj.